



Pilo-Press + E N D

Jara abono 1974

PILO-PRESS

40,-- GM

Eldonanto/Herausgeber:

Internacia
Informservo

Pilo-Press 30,--

Ludwig Pickel
Postfach 2113

E N D 15,--

D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 5142 69

N-ro 23/1973 10 okt 1973
Aperas ĝiusemajne

Denove Milito

Koblentz (pp) Kiam mi ĉe la Esperanto-librostando dum la jarkunveno de GEFA en Koblentz sabate la 6 okt 73 aŭskultis al la radio, mi ek-aŭdis pri la eksplodo de nova milito inter la arabaj landoj kaj Israelo. Estis la duan fojon, ke dum Esperanto-ekspozicio pri milito mi eksciis. En 1967 mi faris E-ekspozicion en Dortmund.

Tiu nova milito en la Proksima Oriento ankaŭ koncernas nin esperantistoj. Por sukcese evolui kaj disvastiĝi Esperanto bezonas la pacon ĉie en la mondo. Pro tio kun doloro kaj malĝojo ni bedaŭras tiun frenezan agon kontraŭ la racio. La "lingvoj de la armiloj" ne povas solvi problemojn kaj emocioj kaj fortaj vortoj same ne kontribuas al tia solvo. Iu honora gastoj, reprezentanto de la germana fervojista sindikato, sub la impreso de la nova militeksplozo diris dum la vespera soleno en Koblentz, ke tiu milito ne okazus, se la araboj kaj israelanoj parolus Esperanton. Certe tiu aserto trotaksas la eblecojn de Esperanto. Tamen tiu eldiro denove montras al ni esperantistoj, ke ni ne devas esti indiferentaj al krizoj, konfliktoj kaj politikaj eventoj.

Nia simpatio kaj solidareco apartenas al la senkulpaĵoj homoj en tiu regiono de ambaŭ partioj. La demandon de la kulpo ni ne povas respondi. Ni nur devas fidi al objektivaj informoj kaj komentoj. Tamen ŝajnas al ni tro simpla kaj naiva la unuflanka kondamno de unu partio. Ne postuloj, sed interparoloj kun la emo al kompromiso povas fine solvi la problemojn de Proksima Oriento. Kaj ĉiuj ŝtatoj, landoj kaj homoj, inkluzive Israelo, devas havi la rajton de ekzisto kaj vivo. Kelkaj arabaj ŝtatoj ne nur 'naĝas' en nafto sed ankaŭ en mono. Por ili estus relative facila afero garantii al la palistinenoj homodignan vivon anstataŭ misuzi tiun monon por fari militon pro dezertoj. Sed eble tio jam estas tro naiva kaj simpla utopio mia.

Ludwig Pickel.

Jarkunveno de GEFA

Koblentz (pp) De la 5 ĝis 7 okt 1973 havis lokon en la urbo ĉe Rhein kaj Mosel la 17a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio. Kunvenejo estis la moderna "Rhein-Mosel-Halle", kie okazis ĉiuj aranĝoj kaj la ekspozicio "Vojo al la mondo". Same tie Libro-servo Ludwig Pickel havis tie ampleksan librostandon.

Post kunsido de la distriktaj komisiitoj sub gvido de prezidanto Joachim Giessner, gvidata rondirado tra la urbo kaj posttagmeza ŝipekskurso sur la rivero Rejno la ĉ. 150 partoprenantoj sabate vespere kolektiĝis al salutvespero kun salutoj de la prezidanto, de gastoj kaj delegitoj. Reprezentantoj de sindikatoj certigis la subtenon por GEFA kaj Esperanto far siaj organizoj. Salutis la kunvenon membroj de aliaj landaj IFEF-sekcioj kaj la iama prezidanto de IFEF, de Jong. Michel Audibert, Parizo, ludis la unuaktaĵon "La advokato" kaj Barbara Kohl el Luksemburgo ravis per sia soprana voĉo la ĉeestantojn.

(daŭrigo sur p. 2)

Jarkunveno de GEFA (daŭrigo de p. 1)

Post la oficiala parto la orkestro "The Monkeys" ludis por dancado.

Kulmino de la jarkunveno estis la dimanĉa matineo, kiun ĉeestis la aŭstralia ambasadoro Ralph Harry, Bonn. Li prelegis pri la temo "Transporto en Aŭstralio". La ĉefaj transportiloj en Aŭstralio estas la fervojo, aviadilo kaj la surmaraj ŝipoj. Estas kompreneble ke tiu prelego, kiu kvazaŭ estis fakprelego, renkontis la intereson de fervojistoj, same la du filmoj, kiuj ilustris la diritajn vortojn.

Elfriede Kruse, Frankfurt/M, sekretariino de GEFA, montris poste lumbildojn pri sia ĉi-somera vojaĝo al Japanio, lando, kiu ĉiam ankoraŭ estas tro multe nekonata al ni eŭropanoj. Apud ĉarmaj bildoj pri turismaj lokoj kaj interesaj fotoj el Esperanto-kunvenoj speciale plaĉis la diapozitivoj pri la loĝejoj kaj loĝejaj instalaĵoj de japanaj familioj. Tiajn bildojn oni malofte povas vidi. Granda aplaŭdo dankis al la prelegintino.

La venontjara jarkunveno de GEFA okazos en la nordbavara urbo Bamberg.

Kion povas fari fakaj asocioj por Esperanto?

Bielefeld (pp) Dr. Werner Bormann, estrarano de UEA por landaj kaj fakaj asocioj, prelegis dum la jarĉefkunveno de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj la 6 okt 73 pri la temo "Kion povas fari fakaj asocioj por Esperanto?". Ĉi-sekve ni publikigas la unuan parton de la prelega enhavo:

"Pro sia amaso da Esperanto-rilatoj la federacia registaro de Germanio ĉi-somere decidis pri afergvidanta ministerio: Ĝi fariĝis tiu por edukado kaj scienco. Delegacio de la estraro de GEA vizitis antaŭ du semajnoj en Bonn "niajn" oficiistojn, do kiuj priasodras Esperanto-aferojn. Ili vidas ŝancojn de plivastiĝo por Esperanto preskaŭ nur en la lernejoj konsiderante la malemon de plenkreskuloj lernadi. Sed "Esperanto en la lernejoj" nuntempe povas signifi nur kiel unu inter pluraj lingvoj, ne Esperanto anstataŭ alia, ekz. la nun ofte kutima angla. Por tio eĉ ekzistas nun favoraj cirkonstancoj pro la kursistemo en la lernejoj kaj la bonvena oferto de Esperanto kiel facila lingvo. Tiam ŝanc-egaligan efikon de Esperanto ja ankoraŭ elstarigis pasintjare dum la 50-a Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig la festparolanto prof. Dr. Rupprecht, departementestro pri lernejoj en kulturministerio.

Tre verŝajne niaj klopodoj ne realiĝos en baldaŭa estonteco. Al "Esperanto la dua lingvo por ĉiuj" antaŭiras periodo de Esperanto kiel unu solvo inter pluraj - io kutima por nia plurisma popolo. Tio refoje klariĝis al nia GEA-delegacio dum santaga aŭdienco ĉe la prezidento de la Federacia Respubliko Dr. Heinemann. Li interesoplene informiĝis pri Esperanto kaj ĝia movado, sed lia opinio pri la vastkonata angla ne estis rapide ŝancelebla. Imponas nur niaj efektivaj faroj. Ilia centra pozicio en nia argumentado ja estis ankoraŭ substrekitita en la salutmesaĝo de prezidento Tito legita dum la ĉi-jara Universala Kongreso en Beograd, kaj prezidento Jonas dum la kongreso en Vieno same konsilis al ni, mem doni al Esperanto urue pli vastan fonon prepare al sukceso.

Prezidento Dr. Heinemann demandis, kio estus la decida breĉobato por Esperanto nuntempe. Mi respondis (sub la inpresado de la prezidenta favoro por la angla): ke Esperanto estu vere agnoskita kiel unu el la eblaj solvoj por la mondlingva problemo. Tia agnosko kutime venas de la scienco, kaj tial esploradoj pri "la kondiĉoj sociologiaj, kulturaj kaj lingvistikaj de komuna norma lingvo uzota en la internaciaj rilatoj (DIF-difino por interlingvistiko) estas urĝe bezonataj." (Daŭrigo en la venonta numero!)

Teatraj kaj muzikaj prezentadoj en Esperanto

Nürnberg (pp) Dum septembro kaj oktobro en

Blieskastel. Daŭ Esperanto in der Lage ist, internationale Kontakte zu schaffen, beweisen seit Jahr und Tag echte Freundschaften über die Kontinente hinweg. So ist es auch dieser internationalen Sprache zu verdanken, daß man vor einigen Tagen in Blieskastel auf eine polnische Gesangsgruppe aufmerksam wurde, die durch ihr überwältigendes Stimmengut Aufsehen erregte.

„EWANGELIJNY RYTM“, so nennt sich die kleine polnische Gesangsgruppe, die von Salvatorianerpater Henryk Irek geleitet wird. Seit den sieben Jahren ihres Bestehens und Erfolges sang diese Gruppe über 1000mal in polnischen Kirchen. „Heute übernimmt das religiöse Lied eine wichtige Rolle in dem Bemühen, die Botschaft des Evangeliums den Menschen zu verkünden“, meint Pater Henryk, und so verbindet er gesprochenes und gesungenes Wort.

FRG okazis vigla kultura agado per Esperanto. Ni jam raportis pri la prezentado de la pola komedio "Proksima Nekonato" fare de Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzynsky en Würzburg, Mainz kaj Bamberg. Jaŭde, 11.10 ili ludos en Hamburg. Pri la prezentadoj en Würzburg kaj Bamberg aperis favoraj recenzoj en la loka gazetaro.

Dum septembro gastis en Blieskastel ĉe ges-roj Bocker la pola ĥoro "Ewangelijny Rytm" gvidata

Polnische Komödie in Esperanto

Die polnischen Schauspieler Kalina Dobrzynsky-Pienkiewicz und Zbigniew Dobrzynsky aus Warschau spielten in Würzburg im Klubraum der Städtischen Galerie die Esperantoverision der polnischen Komödie „Proksima Nekonato“ (Ein naher Unbekannter) von Aleksander Scibor-Rylski.

Die Komödie, die Ehekonflikte persiflierte, fand bei den esperantokundigen Zuhörern großen Anklang dank der großartigen künstlerischen und sprachlichen Leistung der beiden Schauspieler.

Die beiden Polen befinden sich zur Zeit auf einer Deutschlandtournee, nachdem sie zuvor das Theaterstück in den Vereinigten Staaten und in den Beneluxländern zur Aufführung brachten.

Fränkisches Volksblatt
Würzburg 2 okt 1973

de patro Henry Irek, kiu kantis en diversaj lokoj de Blieskastel.

Künstler aus Polen

Zu Beginn des Wintersemesters der Volkshochschule Bamberg hatte Kursleiter R. Brand die polnischen Schauspieler Kalina Dobrzynsky-Pienkiewicz und Zbigniew Dobrzynsky eingeladen, um für die internationale Sprache Esperanto zu werben.

Das einfache Klassenzimmer Nr. 409 der Berufsschule wurde mit wenigen Requisiten zur „Shakespeare-Bühne“. Die kleine Gruppe der Zuhörer erlebte eine künstlerische Meisterleistung. Die Komödie „Proksima Nekonato“ (Ein naher Unbekannter) von Aleksander Scibor-Rylski wurde von den bekannten polnischen Künstlern in der internationalen Sprache so treffend dargestellt, daß selbst Anfänger ein einmaliges Erlebnis hatten. Zbigniew Dobrzynsky studierte an der Akademie für Kunst in Lodz und hat in mehr als 30 Filmen Hauptrollen gespielt, selbst die Regie geführt und Auszeichnungen von anerkannten Kritikern erhalten. Kalina Pienkiewicz ist eine Schauspielerin, die sowohl im Theater als auch im Radio und Fernsehen einen Namen hat. Beide Schauspieler haben als Gäste der Esperanto-Gruppe das tausendjährige Bamberg erlebt, gefilmt und kennengelernt.



Die polnische Gesangsgruppe „Ewangelijny Rytm“ bei ihrem Liedvortrag in der Blieskasteler Gnadenkapelle. Foto: st

La pola ĥoro "Ewangelijny Rytm"

La kantoj en pola, germana kaj Esperanto tre impresis la aŭskultantojn. En tri gazetoj aperis favoraj raportoj kun foto. Antaŭ la alveno en Blieskastel la ĥoro kantis en Aŭstrio, Italio, Francio, Hispanio.

Fulturan kontribuon ĉiam donas la jarkunveno de GEFA, la germana sekcio de IFEF. Kiel ni jam raportis en alia loko, oni ĉi-jare prezentis en Koblenz la unuaktaĵon "La Advokato" de Jacques Cossin en la E-traduko de Jean Thierry. La aktoro Michel Audibert, jam bone konata en la E-medio, ĉiam denove katenas la atenton de la rigardantoj. - Sur muzika kampo nova stelo Escecuta estas Barbara Kohl el Luksenburg, kiu unuafoje prezentis sin al E-publiko en Clerveaux. Ŝi denove entuziasmigus la aŭskultantojn en Koblenz per arioj kaj popolaj kantoj en la traduko de J. Giessner.

Reporto pri la pola teatraĵo en "Fränkischer Tag", Bamberg, 10.10.73

Hamburg valoras vojaĝon

Hamburg atendas vin

1974 Hamburg estos la vojaĝcelo de ĉiuj germanaj esperantistoj!

Komencu viajn preparojn nun! Aligi al la 59a Universala Esperanto-Kongreso. Aldone vi trovas la Unuan Oficialan Bultenon kaj aliĝilon. La kongreskotizoj troviĝas sur la dorsa flanko de la aliĝilo. 1 guldeno egalas al 1 DM. La kotizoj en la unua kolono validas ĝis 31.12.1973 (ne 1974).

Ĝuu la rabatitan kotizon, plenigu tuj la aliĝilon kaj sendu ĝin kune kun la koncerna sumo al

59-a Universala Kongreso de Esperanto
D-205 Hamburg 80, Schärstr. 26
Postscheckamt Hamburg 932 09-207

Se vi estas eksterlandano, sendu ĉion al la Konstanta Kongreso-adreso aŭ al via landa peranto.

Haveblas glumarkoj dukoloraj. 1 folio kun 10 glumarkoj kostas -,50 DM + afranko (-,25 DM). Mendu ĉe Libroservo Ludwig Pickel 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Homoj kaj Nomoj

kun kaj sen renomoj

Prezidanto kaj sekretariino de GEFA, Joachim Giessner kaj Elfriede Kruse, post komuna tagmanĝo kun la aŭstralia ambasadoro, Ralph Harry, en la kunveno en Koblenz, veturis en la ambasadora aŭtomobilo kun la signo CD 0-19-1 al la hotelo. La ambasadoro portis la oran honoran insignon de Sudbavara Esperanto-Ligo.

Prezidento Josip Broz Tito dankis al la esperantlingvaj bondeziroj de la Esperanto-Societo Düsseldorf en angla lingvo okaze de sia 81a naskiĝtago. La dankleteron transsendis la jugoslavia ambasado en Bonn per letero en germana lingvo subskribita de ambasadoro Ĉeljko Jeglič.

Wilhelm Ackermann, prezidanto de la E-Societo Düsseldorf, festos la 79an datrevenon de sia naskiĝo la 11 okt 1973.

La nederlandanoj Hank kaj Yoke Torreman, juna inĝeniero kaj privata sekretariino, veturis 33 000 mejlojn tra 32 landoj. Survoje ili utiligis multajn Esperanto-kontaktojn. En Pakistano, geologo de la universitato Peshawar havis sian unuan Esperanto-konversacion kun la paro. Siavice li povis grave helpi al Yoke, kiam ŝi subite malsaniĝis en fremda lando kaj bezonis kuracadon en la hospitalo de Peshawar.

Ester Haupenthal, kelkjara filineto de Irmtraud kaj Reinhard Haupenthal, ĝojis pri la akirita libro "Ĉu ankaŭ vi scias?", kiam ŝi estis dum kelkaj horoj en la GEFA-jarkunveno en Koblenz. Ŝi bone sciis multajn aferojn, eĉ la ĝustan uzadon de la akuzativo en Esperanto. Sed je la demando, ĉu ŝia panjo fumas, ŝi ne donis respondon.

Radio Bervalio respondas

D: Ĉu povas esti Esperanto-sukcesoj?

R: Praktike jes, teorie ne! Oni ne jam solvis la principan demandon, kio estas "sukceso".

D: Kion mi faru, por ke Esperanto venku?

R: Pilgrimu al Romo kaj adoru la "Madonon de la Espero"!